

4a VERDA NATURISMA SEMAJNO 2023 EN KASTELO GREZILJONO

.1 Vegetaraj manĝoj (verkis Anne-Marie)

En Greziljono dum la naturista esperantista semajno, ni manĝis vegetare, ĉar la nova kuiristino (Christelle) lernis prepari vegetarajn manĝaĵojn kun profesia vegetarana kuiristino.

Vegetara manĝaĵo estas sen viando. Por anstataŭigi viandon, oni povas uzi ovojn kaj lakton. Plie, vegetaj proteinoj povas anstataŭi bestajn. Tion ebligas kunligante legumojn kaj grenojn.

Tiel ni havis tre bongustajn pladojn el lentoj aŭ pizoj, kun grenoj de tritiko aŭ rizo. Ankaŭ estis stufigitaj legomoj, kiel karotoj, kukurbetoj, fazeoloj, cepoj, ktp. Ofte salato el laktuko kaj krudaj legomoj kompletigis la pladon.

Por deserto ni havis ekzemple kukojn el koralaj lentoj aŭ preparaĵojn el jogurtoj kaj fruktojn. Ofte la kuiristo aldonis migdalojn aŭ juglandojn sur la pladojn aŭ la desertojn.

Ĉiuj ĉeestantoj taksis la manĝaĵon bongusta kaj fine satis.

.2 Kurso por progresantoj (verkis Patrick)

Niaj laborkunsidoj estis fruktodonaj.

Ni restudis la precipajn gramatikaĵojn kaj sintaksajn regulojn tra la legado de tekstoj eliritaj de Kongresa Sciulo (la kongresa gazeto eldonita dum la UK en Montrealo).

Ni provis trovi la ĝustan esperantan vorton kiu ne nepre similas al la franca radiko aŭ etimologio. Alidirite, ne devas pensi esperante kaj liberiĝi de niaj gepatralingvaj devigoj aŭ frazaranĝoj.

Jen ekzemploj:

- Kiel diri « mortel »?
 - o se ni parolas pri la homo kiu mortos, ni devas elekti: « mortonto »,
 - o se ni volas paroli pri tio, kio povas mortigi, ni devas uzi: « mortiga »,
 - o se ni multe ŝatas la kurson, ni povas proklami ke ĝi estas « mojosa ».
- Kiel diri « commander »?
 - o se mi rete aĉetas libron, mi « mendas »,
 - o se mi havas dungitojn, mi « komandas ».
 - o se mi estas oficiro, mi « ordonas ».
- Kiel diri « doux »?
 - o mia haŭto estas « milda »,
 - o mi manĝas « dolĉajn kukojn ».

Nia laboro iĝis luda enketo kaj konstruaĵa ludo.

Ni atingis novan kaj efikan nivelon, kiu favorigos direktan mergiĝon en esperanta lingvo.

.3 Ekskursoj (verkis Dominique)

Dum la kvara verda semajno de Greziljono, mi estis la sola persono de la regiono de Angers.

Mi decidis montri al ĉiuj partoprenantoj kelkajn aferojn pri mi regiono, ezeemple la trogloditan vivon en la malgranda vilaĝo « Cornillé les caves », la lokan ludon « la boule de fort » aŭ la ruinojn de la kastelo de « Beaufort en vallée ».

Tamen, mi estas ankaŭ naturisto kaj membro de la loka asocio « NatAnjou ». Kiel ĉiujare mi kondukis la partoprenantojn al ties tereno, kie ĉiuj povis naĝi en varma naĝejo kaj malstreĉiĝi.

NatAnjou estas asocio kun proksime cent tridek membroj kiu havas terenon je du mil kvadrataj metroj kie oni povas tendumi. Ĝi ankaŭ posedas sanitarajn facilitaĵojn kaj diversajn ludilojn.

NatAnjou estas bona loko por ripozi, amuziĝi kaj renkonti diversajn amikojn el la tuta mondo.

.4 Vizito de Cornillé les caves (verkis Rosy kaj Marc)

Dum la staĝo ni vizitis Cornillé les Caves. Tiu ĉarma vilaĝo havas apartan karakterizon : siajn trogloditajn logxejojn. Fakte, tiu vilagxo estas kontruita sur monteto kavita de galerioj.

20 km da galerioj estis kavigitaj inter la 16a kaj la 20a jarcentoj por eltiri ŝtonojn « le tuffeau » uzita por la konstruaĵoj. Ili ankaŭ estis uzitaj kiel domoj por homoj.

Asocio kreiĝis por valorigi ilin. Ĝia celo estas la savo de tiu patrimonio. Ĝi vizitigis al ni la domon de sinjoro Camus, kiu vivis tie fine de la 19a jarcento. Do ni vidis kiel familio vivis en tiu epoko.

Poste ni eniris en la terenon de « la boule de fort ».

La « boule de fort » estas tradicia ludo en « Val de Loire ». La pilko uzata havas gravitan centron iomete flanke de sia akso de irado. Do ĝi neniam sekvas rektan iradon. Plie la tereno disponas je altigitaj bordoj. Fakte pilko malrapide zigzagas por iri al sia celo: pilketo kiu estas ĉirkaŭ 20 metrojn fore. La « boule de fort » estas agnoskita kiel tradicia ludo el la regiono « Pays de la Loire ». Ni vere ĝojis viziti tiujn du vidindaĵojn.

.5 Postaranĝa konkludo (verkis Angeline)

Estas tre facile, eble tro facile, perdiĝi dum la ĉiutaga vivo. Dum la jaro, ni laboras kaj zorgas pri la familio ktp sed fojfoje ni bezonas paŭzi.

Kia plezuro renkontiĝi kaj retroviĝi danke al Esperanto!

Verkis ĉiun apartan artikoleon progresanto(j) dum la verda naturisma semajno, kun la helpo de ilia gvidinto Didier.